**Dioksina skandalo**

Apenaŭ forgesinte la fi-diluadon de vino per glikolo, neglektinte la hormone traktitan bovidajon, ignorinte la gene manipulitajn tomatojn, kaj jus kolektinte novajn fortojn post la BSE-skandalo ni nun ektimas pro nova grandskala teruro, nome pri la enhavo de dioksino en bestaj kaj homaj nutrajoj. Ne nur ovoj kaj kokidoj entenas la forte kancerigan venenon, sed ankaŭ produktoj el porkaĵo kaj bovaĵo povas esti kontaminataj.

Preskaŭ ĉiun tagon novaj listoj estas publikigataj, kiun nutraĵon oni prefere ne manĝu. Kelkaj supermerkatoj forigis - pro kaŭzo de sekureco - de siaj bretaroj la varojn, kiuj eble povus esti danĝeraj. Aliaj ne tiom skrupule traktas la aferon kaj plue vendas hepatopasteĉon, kremaĵon kaj ovaĵon el lando konviktita pri kulpo.

Kio estas dioksino? Por multaj personoj la vorto egalas al 'supervenena veneno', do venenego. Fakte ne temas pri unusola substanco, sed pri granda grupo da organikaj kombinaĵoj. De la entute 210 dioksinoj kaj la simile konstruitaj furanoj (t.e. heterociklaj kombinaĵoj, bazo de multaj aliaj substancoj) 17 estas rigardataj eksterordinare venenaj por homoj.

Dioksino liberiĝas el aŭtomobilaj ellas-tuboj, el ĉiuspecaj brulgasaj motoroj, el forbruligaj instalaĵoj por rubo, el ŝtalfabrikoj, sed ankaŭ el tute naturaj forbrul-procezoj, kaj la venenego disvastiĝas en la medio. Vivestaĵoj en la ĉirkaŭo enkorpigas precipe per la nutraĵo la dioksinon, kiu amasiĝas en la grasa histo de la korpo. Altaj dioksinkoncentriĝoj - ekzemple post ĥemifabrikaj akcidentoj - povas kaŭzi ĉe homoj aknon pro ĥloro, hepatodamaĝon, perturbojn de la nerva sistemo. Sed ankaŭ malaltaj koncentriĝoj de tiaj substancoj (ekz. okaze de la *'Sevesa'*-dioksino jam miliononо da gramo per 1 kg da korpomaso) povas - laŭopinie de multaj spertuloj - damaĝi la imunosistemon kaj kaŭzi kanceron.

Jam ekaŭdiĝas fortaj postuloj pri pli intensaj kontroloj kaj pli rigidaj ŝtataj reglamentoj por pli efika sanprotektado de la civitanoj. Ĉu helpos el la dilemo: nun tuj multobligi la jam ekzistantan armeon de nutraĵinspektoroj kaj veterinarkontrolistoj? Kiu respondecas pri la katastrofo? Ĉu la spekulativa kapitalmerkato aŭ la tielnomata 'globalizado', la merkata tutmondeco? Ĉu denove instali protektan barilon inter 'kulpaj' kaj 'senkulpaj' landoj, eble rec krei landlimojn kiuj antaŭnelonge estis forigitaj en la kunkreskanta Eŭropo?

La ve-kriado de registaroj kaj de konsumantoj fakte estas malforta reago kontraŭ la blinda akceptado de ĉiuj fenomenoj rezulte de moderna globalizado kiel validan 'leĝon de mondmerkato', kvazaŭ kiel naturleĝon. Inter naturaj kaj mondmerkataj leĝoj tamen estas grava diferenco. Naturleĝojn kreis la senerara, perfekta naturo. Mondmerkataj leĝoj nerefuteble estas la sekvo de homa konduto. Bedaŭrinde, homa konduto estas tre malproksima disde senerareco kaj perfekteco. (*sa*)



**Sonĝo kaj profunddormado**

Homo estas tagaktiva kreaĵo, kiu preterdormas preskaŭ trionon de sia vivo. La dormo estas supraĵe karakterizita per malalta korpa aktivado kaj limigita perceptado de la ekstera mondo, kvazaŭ speco de 'subtena' aŭ 'minimuma korpokonservado'. Tio tamen ne signifas, ke la cerbo estas elŝaltita. Dumnokte superregas antaŭ ĉio la ecoj de la dekstra cerboduono, la fantaziado kaj la libera asociado. Ne ekzistas cerbocentro, kiu ekskluzive respondecas por la dormado. La dormo distingeblas disde komato aŭ narkozo ke ĝi rapide ĉesas pere de vekado.

La dormo (kiu dum la vivo diferenciĝas -mezureble per elektroencefalogramo = EEG- inter daŭro, profunddormkvoto kaj ofteco de la dormfazoj) klare subdividas sin en du diversajn formojn, nome la t.n. *'nonREM'*-dormo (*Non Rapid Eye Movement* = nerapida okulmoviĝo) kaj la *REM*-dormado (rapida okulmoviĝo).

La *nonREM*-dormo estas la profunddormado. En tiu fazo la korpo regeneriĝas kaj liberiĝas kreskighormonoj. Kompare, la *REM*-dormofazo respondecas por la fizika bonfarto; la plimulto de muskolaj partoj (escepte koro, diafragmo, okuloj kaj la glata muskolaro) malstreĉiĝas; la homoj sonĝas dum la regulaj, proksimume ĉiu horo aperantaj sonĝofazoj, la centra nervosistemo estas aktiva.

Ĉe pli alte evoluintaj animaloj kaj ĉe la homo, la dormo estas necesa por la funkciado de la cerbo, kaj per tio por la kunordigita kunlaboro de ĉiuj korpofunkcioj.
(Fonto: *Main Post* n-ro 91, 1999-04-21, p.J1)

**Tricent mil ratkaptistojn**

Tajlando volas dungi kaj pere de tio trafi duoblan celon, nome provizon de laboro kaj malaltigon de epidemia danĝero. Kiel informis la *Bangkok Post*, proksimume 20 milionojn da ratoj estos ekstermataj dum la kampanjo. La entutaj kostoj de 25 milionoj *Baht* (ĉirkaŭ 600 000 eŭroj) venos de Japanaj kreditoroj por la recesioturmentita lando.
(Fonto: *Main Post* 1999-04-17, p. J12)

**Aŭtora manuskripto**

La granda dana aŭtoro Hans *Christian* ANDERSEN havigis grandan enspezon al familio en Jutlando. La rakonto 'La ŝtono de filozofo' estis aŭkcita por rondsume 68 000 eŭroj, raportis la gazeto *Jüllands Posten*. La poeto donacis la manuskripton al la familio en la jaro 1859, post kiam ĝi estis gastiginta lin dum vojaĝo tra Jutlando.
(Fonto: *Main Post* 1999-04-17, p. J12)